Annette von Droste-Hülshoff,

Ĉe l' lageto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Jen ĉe arbara rando
Murmuras en kviet',
Jen ĉe picea vando
Sin lulas la laget'.

Jen kie en sunbrilo
La ondo kisas la
Lagbordon, la scintilo
De l' akvo ravas ja.

Ĉiloke fokusiĝas
La tuta sunradi',
Kaj tie mi sidiĝas
Por pentri ĉion ĉi.

Senventa anguleto,
Verdriĉa estas ĝi;
En tiu ĉi loketo
Senĝene sidas mi.

Sur muskon elmetinte
Mantelon mian nun
Kaj dorse apoginte
Min al piceo kun

Herbar' sur sino mia
Min ravas iluzi':
Ĉu en tagsongo ia
Someron ludas mi?

Se grilo en herbaro
Ne ĉirpas pro malem'
Kaj mutas la birdaro,
Mi kantas ion mem.

Kaj se natur' prezentas
Malmulton nur al vi:
Feliĉon oni sentas
Ja vere nur en si.

...

Traduko de la Germana poemo "Am Weiher" de Annette von Droste-Hülshoff *(∗1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-158-312 (2004-02-04 14:54:28)